



PILO-PRESS
Internacia
Informservo

Esperanto en Radio

Atentu la rubrikon
en **E D R** kaj
la Radio-bulleton

Eldonanto, Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 15/77 - 9 aprilo 1977
Aperas ĉiusemajne

Esperanto - die
ungeliebte Weltsprache IV

La ne-amata lingvo monda

En speciala aldono "Eŭropo kaj la Mondo" al 4 mondaj gazetoj aperis bonega, trafa artikolo pri Esperanto, kiun ni sube aperigas:

EUROPA UND DIE WELT

Die ungeliebte Weltsprache

Es ist noch kein Jahrhundert her (1887), daß der Augenarzt Ludwig Lazarus Zamenhof in Warschau die erste Erklärung über eine neue „internationale Sprache“ veröffentlichte, über das Esperanto.

Es ist eine der etwa 500 künstlichen Sprachen, die seit Mitte des 17. Jahrhunderts bis zur Gegenwart dem unbesiegbaren menschlichen Drang Rechnung tragen, ungehindert miteinander sprechen zu können.

Unter allen Konkurrenten war es nur das Esperanto, das sich ein internationales Publikum erobert hat. Sein stärkster Gegner, Interlingua, macht im wissenschaftlichen Bereich zwar große Fortschritte, scheint aber seine relativ späte Entstehung dadurch nicht wettzumachen: Interlingua existiert erst seit etwa 30 Jahren.

Esperanto ist das Werk eines einzelnen Mannes, der zwar polyglott, aber kein Linguist war (Zamenhof war Jude und Zionist und sprach russisch und polnisch ebenso wie deutsch und französisch, und er war mit dem Lateinischen, dem Griechischen und dem Hebräischen vertraut).

Esperanto ist heute jedoch eine Sprache, die sich im Laufe der Jahre abgeschliffen hat. Zamenhof und seine Anhänger haben auf eine einwandfreie wissenschaftliche Sprache verzichtet, und so hat sie gegenüber anderen den Vorteil, weich und formbar zu sein und

sich zu erneuern. Wer Esperanto spricht, tut dies mit der Leichtigkeit eines Franzosen, der französisch, oder eines Italieners, der italienisch spricht.

Dennoch tritt Esperanto auf der Stelle. Oder vielmehr erscheint es den Esperantisten, als kämen sie nur im Schnecken-tempo voran. Sie wundern sich, daß sie seit so vielen Jahren immer wiederholen müssen, was für sie ein Beweis für die Notwendigkeit ihrer Sprache ist: Alles Unglück der Menschen kommt daher, daß sie sich nicht verstehen oder dies nur unter großem Kostenaufwand können, mit immer mehr Dolmetschern und Übersetzern (zumindest in Europa). Alles wäre so einfach, wenn jeder unter Beibehaltung seiner Muttersprache und irgendeiner anderen Sprache, die ihm gefällt, sich der Hilfsp Sprache Esperanto bediente.

Man fühle sich unverstanden, das Echo blieb aus. Die militanten Anhänger haben die abweisende Haltung einem nationalistisch-imperialistischen Komplott zugeschrieben. Was nicht allzu ernst zu nehmen ist. „Der Mensch — Jean-Jacques — ist von Natur aus weder gut noch vernünftig, wenn er es eigentlich sein sollte“.

Und das erklärt vielleicht die paradoxe Erscheinung, daß so viele Argumente, so viel Aktivität und Engagement für das Esperanto so wenig bewirkt haben: In der Bejahung des Esperanto liegt so viel Rationales, daß es uns zuviel wird...
JACQUES CELLARD

Dienstag, 5. April 1977 - Nr. 80

THE TIMES
DIE WELT

Le Monde
LA STAMPA

Joseph F. Berger 1894 - 1977

Kiel ni jam mallonge informis, Joseph F. Berger, Köln, mortis la 28-an de marto en la aĝo de 83 jaroj. Li naskiĝis la 7-an de oktobro 1894 en Edersdorf, Ĉeĥoslovakio kaj esperantistiĝis en la jaro 1910. Jam baldaŭ li fondis Esperanto-grupon en Waldshut, gvidis kursojn tie, en Hispanio kaj poste en Köln. Ĝis 1934 li estis redaktoro ĉe Heroldo de Esperanto. Post la dua mondmilito la mortinto redaktis "Esperanto-Post" kaj poste ĝis 1961 la tiaman "Germanan Esperanto-Revuon".

Sed li estis ne nur Esperanto-aktivulo, Esperanto-redaktoro. Li tradukis (La vojo returne, En Okcidento nenio nova), li mem verkis en fluanta, bildrica kaj trafa stilo. Kaj poeto li estis, pri kio ankaŭ atestas la multaj tradukitaj poemoj. Li posedis multflankan klerecon kaj scipovis multajn lingvojn, kio kapabligis lin esti bona recenzanto de libroj kaj verkoj.

La Esperanto-movado perdis elstaran reprezentanton, kiuj maloftas en Esperantujo, la gesamideanoj perdis afablan-agrablan samideanon de la malnova generacio. Li restos neforgesita!

Eugen Wüster 1898 - 1977

En la aĝo de 79 jaroj mortis la 29-an de marto prof. d-ro Eugen Wüster, Wiesenburg, Aŭstrio. La kulmino de lia Esperanto-agado estis jam antaŭ 50 jaroj, kiam li estis elstara sciencisto de Esperanto. De li devenas la vorto Esperantologio kaj la denove nun uzata esprimo "planlingvo". Liaj esperantologiaj artikoloj profunde kaj klarvide sekvis la strukturon de la lingvo kaj grave kontribuis al la scienca fikso de la Esperanta vortsistemo. Tre grava estis lia laborado pri la teknikaj vortaroj. Lia granda Enciklopedia Vortaro E-G, de kiu bedaŭrinde nur aperis 4 volumoj de A-K, estas la plej funda kaj detala registro de la Zamenhofa lingvo-uzo. Wüster ankaŭ konatiĝis kiel Esperanto-tradukanto. Lia plej grava verko - en germana lingvo - tamen estis la eldonaĵo "Internationale Sprachnormung in der Technik" (Internacia lingvonormigo en la tekniko) 1931. En la jaro 1966 aperis aktualigita represo de tiu grava verko, kaj en la jaro 1970 sekvis tria pliampleksigita eldono.

Nova Konstanta Kongresa Sekretario

Charles R.L. Power (Karl Pov), Usono ekde la 17-a de marto 1977 fariĝis la nova Konstanta Kongresa Sekretario de UEA.

Paskaj prilingvaj konsideroj

Dum la paskaj tagoj mi trovis en la vortaro de Wingen "Deutsch-Esperanto" ankaŭ la tradukon "Verda Jaŭdo" por Gründonnerstag. Tio estas grava eraro. Ĉar "Gründonnerstag" ne devenas de la koloro grŭn - verda, sed de la malnova germana esprimo greinen - plori, do Greindonnerstag. Jesuo estis kaptita je la vespero de tiu tago, tial la Kristanoj ploras.

Mi nun proponas nur uzi la pli bonajn kaj pli korektajn esprimojn "Sankta Jaŭdo", "Antaŭpaska Jaŭdo" aŭ "Alta Jaŭdo". Tio estas komprenebla en ĉiuj landoj. (En Nederlando ekz. ĝi estas la "Blanka Jaŭdo". Eble la kaŭzo estas la jena: La krucifikso sur la altaro estas kovrita per blanka tuko tiun tagon, ne per viola.)

TRIXINI

Esperanto en Radio

Kiel aldono al tiu numero de Pilo-Press la legantoj trovas radio-bultenon "Esperanto en Radio". Tiu bulteno estas sekvo de la diskuto pri eventuala internacia radio-revuo en Esperanto. En tiu bulteno estas aperigita ankaŭ polemikaj politikaj komentarioj de Radio Varsovio kaj de ORF Vieno. Kiel ni jam skribis en la bulteno la tie esprimitaj opinioj kaj starpunktoj estas sole tiuj de la koncernaj radio-stacioj. Politikaj programoj ja estas esencaj partoj de la Esperanto-programoj, ni nur volis doni foje kelkajn ekzemplojn. Same aperis en n-ro 7-8/76 de Eŭropa Esperanto-Revuo 5-paĝa rubriko "Esperanto en Radio".

Gemeliĝa kunveno

Nidda (pp/elkr) - Dum la semajnfino, 2-a/3-a de aprilo, okazis la unua renkontiĝo inter 9-kapa delegacio el Crest, Francio, kaj membroj de la magistrato de Nidda. Ĉeestis ambaŭflanke esperantistoj, kiuj grave kontribuis al la interkompreniĝo kaj bona harmonio dum la dutaga restado. Ili sukcesis interesigi la kompetentajn instancojn kaj kelkajn lokajn instruistojn pri la aplikado de Esperanto en la reciprokaj interrilatoj. La gastigantoj en Nidda ofertis interesan programon tiel ke la gastoj ricevis bonan superrigardon pri la evoluo en la urbo de sia ĝemeliĝo. Oni nur povas esperi, ke pere de Esperanto la kontaktoj kreskos kaj kondukos al pozitiva rezulto. En la kunveno partoprenis ankaŭ s-ino Elfriede Kruse, IFEF-sekretariino, Frankfurt.

Semajnfino por infanoj

La Chaux-de-Fonds (pp/sej) - 17 infanoj kaj 5 plenkreskuloj rendevuis la 19-an kaj 20-an de marto en Gastejo Edmond Privat, nun ankoraŭ modesta restadejo. Se la junaj esperantistoj ĉefe kontentis pri la mangoj, ja ankaŭ la ludoj, eksteraj kaj internaj, la interesa manlaboro kaj la aŭdvida lingvo-ekzerco plezurigis ilin; kaj oni rajtas supozi, ke ankaŭ la litoj kaj matracoj plaĉis al ili.

La venonta semajnfino por infanoj kaj geknaboj okazos la 7-an kaj 8-an de majo 1977 en La Chaux-de-Fonds.

Junularaj semajnfinoj: de la 23-a ĝis la 24-a de aprilo en Grand-Lancy, Genevo; de la 18-a ĝis la 19-a de junio 1977 en La Chaux-de-Fonds kun asemblea kunsido de Svisa Esperanto-Junularo.

Informojn donas: Svisa Esperanto-Junularo, 5 Cure, CH-2035 Corcelles.

Turisma Centro de PEA

Bydgoszcz (pp) - Komence la 1976-a jaro surbaze de la kontrakto inter Burco de Eksterlanda Turismo por Junularo "JUVENTUR" kaj Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio (PEA) estis fondita en Pollando Turisma Centro de Pola Esperanto-Asocio kun sidejo en Bydgoszcz.

Tiu ĉi dokumento ebligis al PEA intensigi kaj pli bone organizi internacian Esperanto-turisman, kiu ludas gravan rolon en la vivo de PEA. Rezulte en 1976-a jaro entute pli ol 2 500 membroj de PEA utiligis la servojn de Turisma Centro de PEA. Al Bulgario forveturis pli ol 1000 personoj, al Ĉeĥoslovakio kaj Hungario po pli ol 250 personoj, 40 al Grekujo kaj ĉirkaŭ 1000 feriadis dum la Esperanto-aranĝoj en Pollando aranĝitaj de "JUVENTUR" kaj Turisma Centro de PEA.

Novembre dum la Dua Internacia Foiro de Esperanto Turismo, kiu okazis en Bydgoszcz, estis subskribitaj kontraktoj por la 1977-a jaro. La Vintrajn Esperanto-Feriadojn en Pollando ĉi-februare partoprenis jam 750 gejunuloj. Por somero estas prizorgitaj en Pollando pli ol 500 lokoj por gejunuloj kaj pli ol 1 500 lokoj por pli aĝaj esperantistoj polaj kaj eksterlandaj. El Pollando forveturos al Bulgario 750 membroj de PEA, al Ĉeĥoslovakio 500, al Hungario 400. Al Pollando en 1977 venos pli ol 1000 esperantistoj, nome 350 el Ĉeĥoslovakio, 300 el Bulgario kaj ĉ. 200 el Hungario. Entute en 1977 "JUVENTUR" kaj Turisma Centro de PEA priservos pli ol 5 000 esperantistojn.

"JUVENTUR", str. Jagiellońska 12, PL-85-067 Bydgoszcz, Pollando, ĉiam atendas pliajn proponojn pri sendevizaj intersanĝoj de Esperanto-grupoj, kiuj ebligis al polaj esperantistoj pere de Turisma Centro de PEA novajn internaciajn Esperanto-kontaktojn kaj al eksterlandaj esperantistoj malmultekoste kaj interese viziti Pollandon, patrujon de Esperanto en la 90-a datreveno de Esperanto.

Manifesto 1977

Wembley (pp) - Prof. d-ro Ivo Lapenna, la iama prezidanto de UEA, dissendis al la redakcioj de Esperanto-periodaĵoj kaj al la Esperanto-fakoj de radio-stacioj tekston de "Manifesto 77 de la Esperanto-Movado" kun la titolo "Por paco en libereco - Por libereco en paco", en kiu li pledas por la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. La "Manifesto 77" konsistas el 5 paragrafoj kaj 4 notoj. Esperanto-organizaĵoj kaj unuopuloj estas vokataj aprobi kaj kunsubskribi la "Manifeston 77"

El la 3-a paragrafo ni citas: "La internacia leĝigo de la homaj rajtoj estas rezulto de longaj, insistaj klopodoj, en kiuj elstaran rolon ludis influaj unuopuloj, diversaj pregrupoj kaj neregistraj organizaĵoj. Inter ili estis ankaŭ multaj Esperanto-asocioj kaj societoj agantaj konforme al la plej ĝenerala celo de la Esperanto-Movado: per simpla, neŭtrale homa lingva rimedo de komunikado plifaciligi ĉiaspeciajn semperajn spiritajn kaj materiajn kontaktojn inter la homoj, sen kia ajn diferenco laŭ nacieco, raso, religio, politika opinio, lingvo, sekso aŭ kia ajn alia stato. Eĉ pli, meze de 1947, do pli ol unu jaron antaŭ la akcepto de la Universala Deklaracio, la Statuto de Universala Esperanto-Asocio (UEA) - tiutempe reprezentanta monda organizaĵo de la partipolitike neŭtrala Esperanto-Movado - estis amendita per jena aldono: UEA deklaras, ke la respekto de la homaj rajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo. Efektive, en la periodo 1948-1974 UEA, inspirita de humanecaj motivoj, aktive partoprenis en ĉiuj mondskalaj kampanoj por la homaj rajtoj laŭ propraj ampleksaj agadprogramoj;....." (La substrekoj okazis fare de Pilo-Press!)

Certe estas nobla tasko por ĉiu esperantisto, pledi por la homaj rajtoj kaj subteni ĉiujn agadojn por ties realigo. Tamen ni atentigas al ĉiuj esperantistoj kaj speciale UEA-membroj, kiuj volas aprobi kaj kunsubskribi la "Manifeston 77" de prof. d-ro Ivo Lapenna, atentë legi la substrekitajn frazojn.

Laŭ nia kompreno la iniciatinto de tiu "Manifesto" en tiu teksto asertas ke la nuna Universala Esperanto-Asocio ekde 1974, do ekde la Hamburga Kongreso, ne plu estas "reprezentanta monda organizaĵo de la partipolitike neŭtrala Esperanto-Movado" kaj ka la nuna UEA ne plu estas "inspirita de humanecaj motivoj".

Reagoj, opinioj

Nun al numero 14 de Pilo-Press. Mi trovas la enhavon "Pri atomenergio" (p.3.) tre subjektiva, ĉar ankaŭ multaj ne-komunistoj dubas pri la valoro de atomenergiejoj. Kial oni preskaŭ silentigas en oficialaj komunikiloj la verajn alternativojn...Vidu, ni ne kredis eterne ke "altaj produkti-ciferoj" estas neevitebla "sankta" faktoro. Ni vivas nuntempe en sociordo kies tipa konilo estas "aĉetado kaj forĵetmentaleco". Ĉu vi konas la esprimon "ne uzu tro da perforto kontraŭ la Naturo, ĉar la Naturo rebatas senkompatem". Ni komencis jam senti la verajn efikojn de tiu instru-doktrino. Ĉu ne? Vere novajn radikalajn paŝojn, vojojn la homaro devas trovi por povi vere saĝe solvi la estontec-problemojn, jam la nunajn problemojn. Mi scias ke la raporto estas el Esperanto-elsendo de ORF, Wien, sed tamen, mi esperas, ke vi donu spacon ankaŭ al kontraŭaj opinioj en tiu ege grava, urĝa demando, speciale por la jam tro-industriigitaj landoj..."

Bertil Englund, Bad Kissingen

Vortaro Butin-Sommer Esperanto-Deutsch

La konata vortaro "Esperanto-Deutsch" de Butin-Sommer nun denove estas havebla kiel fotorepreso laŭ la eldono 1952. La nuna prezo estas 15,- GM

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, 8500 Nürnberg 1

PSchK Nürnberg 819 56-851, Stadtparkasse Nürnberg 1.901.579.